

Heinrich Heine,  
Milde fluas tra la  
kor’

*tradukita de Valentin Melnikov*

Milde fluas tra la kor’  
kanto primavera.  
Flugu, melodi-sonor’,  
en la vast’ aera.

Flugu longe, sen ripoz’,  
super domoj flutu.  
Se troviĝos tie roz’ –  
ĝin de mi salutu.

*Traduko de la Germana poemo  
“Frühlingsbotschaft” de HEINRICH  
HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-  
17) en Esperanton de Valentin  
Melnikov.*

*Arg-527-1044 (2010-03-15  
17:53:18)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo estas -  
kun permeso de s-ro Valentin Mel-  
nikov - prenita el ties reta kolekto  
[http://www.esperanto-mv.  
pp.ru/Melnikov](http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov) . Vidu:  
[http://www.esperanto-mv.  
pp.ru/Melnikov/Heine.html](http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov/Heine.html) .  
Vidu ankaŭ: [http://www.  
esperanto.mv.ru/Melnikov/  
index.html](http://www.esperanto.mv.ru/Melnikov/index.html) .*

Heinrich Heine,  
Printempa saluto

*tradukita de Ludwig Emil Meier*

Iras ĉarma sonoret’  
Tra de mi animon.  
Sonu printemo kantet’  
En la malproksimon!

Ĝis la dom’ forsonu vi,  
Kie floroj pendas!  
Diru al la roz’, ke mi  
Saluteton sendas.

*Traduko de la Germana poemo  
“Frühlingsbotschaft” de HEIN-  
RICH HEINE (\*1797-12-13 –  
†1856-02-17) en Esperanton de  
LUDWIG EMIL MEIER (\*1847-  
02-16 – †1919) en 1908.*

*Arg-527-1045 (2010-03-14  
15:53:26)*

*Tiu ĉi esperantigo de la poemo  
estas vere iom fuŝe tradukita. Ĝi  
aperis en programo de koncerto  
el la jaro 1908 (laŭ informo de  
la dana s-ano Lars Kromann  
[[lars.kromann@mail.dk](mailto:lars.kromann@mail.dk)]. Pri  
Ludwig Emil Meier rigardu  
ankaŭ la vikipedian retejon  
[http://eo.wikipedia.org/  
wiki/Ludwig\\_Emil\\_Meier](http://eo.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Emil_Meier) . Li  
verkis interalie la kant-libreton  
“Esperantista Kantaro”, kiu  
aperis en 1907 ĉe la Esperan-  
ta eldonejo de Hans Theodor  
Hoffmann en Berlino.*

Heinrich Heine,  
Softe, vibras tra  
l’anim’

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

Softe vibras tra l’anim’  
melodi’ tenera,  
flugu al la malproksim’,  
kanto primavera!

Flugu al florbeda dom’,  
kaj se tie ĉarme  
ridos roz’, en mia nom’  
sin salutu varme.

*Traduko de la Germana poemo  
“Frühlingsbotschaft” de HEINRICH  
HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-  
17) en Esperanton de KÁLMÁN  
KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo,  
\*1911 – †1976).*

*Arg-527-1088 (2010-05-27  
11:29:19)*

*El la poezia volumo “Kanzonoj de  
Heine”.*